

TKKE informas

N-ro 2 Februaro 1956

Aperas laŭbezone

Raporto pri la laborkunsido de la TKKE-estraro, kiu okazis la 8-an de januaro 1956 en Olomouc.

Sub prezido de s-ano Josef Vítck, prezidanto de TKKE-ĈSR, (Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en ĈSR) okazis posttagmeze la 8-an de januaro 1956 en Olomouc laborkunsido de TKKE-estraro.

Ĉeestis: gesamideanoj Josef Vítck, prezidanto de TKKE, Miloš Rudolf, sekretario de TKKE, Josef Kožený, vicprezidanto kaj estro de la organiza sekcio, Eduard V. Tvarožek, prezidanto de Slovaka TKKE-sekcio, D-ro Vlad. Mohapl, estro de TKKE-presoj kaj estraranoj Evjáková, Matušová, Slaný, Lička, Vondroušek, Kořínek, por la Junularo Drah. Kočvara. Kiel gasto partoprenis la laborkunsidon reprezentanto de Jugoslavia Esperanto-Federacio s-ano Doběnik Matka.

Rezultoj:

- 1) Fondo de scienca sekcio de TKKE – estro s-ano D-ro Jaromír Jermář.
- 2) Organiza sekcio (s-ano Jos. Kožený) preparos aliĝilon en UEA-n.
- 3) La 41-an UK en Kopenhago partoprenos TKKE-delegacio kaj E-kultura delegacio.
- 4) Ĝisnunan duonoficialan organon "Nia Spegulo" anstataŭigos "TKKE-INFORMAS".
- 5) Estis pritraktita la letero de Hungarlanda Esperantista Konsulta Komitato, en kiu proponas Hungarlandaj esperantistoj organizi la II-an Danubvalan Esperanto-Konferencon en jaro 1956 somere en Bratislava (ĈSR). Laŭ decido de TKKE-estraro rekognoskos la aferon en Bratislava slovaka reprezentanto s-ano Tvarožek kaj pri atingitaj rezultoj li informos TKKE-n. TKKE-ĈSR petas E-Asociojn en Hungarujo, Jugoslavio, Bulgario, Pollando kaj samideanojn en Sovetunio kaj en Rumanujo, ke ili pridiskutu la aferon, informu TKKE-ĈSR (sekretario s-ano Miloš Rudolf, Wanklova 14, Olomouc), ĉu ili akceptus la proponon de HEKK kaj ĉu iliaj ŝtatoj permesus al ili nombran partoprenon.

II-a KONFERENCO DE POPOLDEMOKRATIAJ ESPERANTISTOJ en BRATISLAVA (la 6-an ĝis 9-an de julio 1956)

I-a informo.

(pluaj informoj sekvos nur post aprobo de la konferenco fare de komisiitoj kaj ministrio por kulturo.)

TKKE nun sia konferenco en Olomouc decidis aranĝi konferencon de esperantistoj el popoldemokratiaj landoj kune kun la konferenco de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Laŭ la propono de Hungarlanda KKE estis komisiita aranĝi la konferencon Esperanto-grupo ĉe Kleriga domo en Bratislava.

Esperantistoj en Bratislava volonte akceptis la aranĝon kaj faris necesajn preparojn. Estis elektita Loka konferenckomitato, kiu zorgos, ke la konferenco ĉiurilate sukcesu. Kompreneble oni kalkulas kun helpo de ĉiuj samideanoj.

Provizora programo:

La 6-an de julio 1956 (vendrede):	interkonatiĝa vespero
7-an (sabate):	antaŭtagmeze kaj posttagmeze laborkunsidoj vespere artprogramo
8-an (dimanĉe):	antaŭtagmezo de eksterlandaj gastoj posttagmeze komuna laborkonferenco vespere artprogramo
9-an (lunde):	ekskursoj

Vesperajn artajn programojn prizorgos niaj artistoj el Praha, Brno, Olomouc kaj el aliaj lokoj.

La konferenco jam nun vekas grandan intereson ne nur en nia respubliko, sed ankaŭ en eksterlando. Ni estas informitaj, ke pri la proponata konferenco raportis la nederlanda preso.

Dr-ino M. Šaturová-Seppová

DE MALSUKCESOJ NI LERNAS.

Atingitaj sukcesoj spronas nin plu daŭrigi kun entuziasmo nian laboron, kiu celas helpi la homaron. Ni do trovas utila rerigardi la esperantistan aktivecon en Sovet-Unio kaj en la popoldemokrata landaro dum la pasinta jaro.

La jaro 1955 signas gravan sanĝon en la opinio de aŭtoritatoj kaj instancoj pri la Internacia Lingvo: la oficiala malfavoro iom post iom forvelkas kaj aperas signoj pri surpriza favoro kaj pri senantaŭjuĝa konsidero pri la rolo de Esperanto. Tiu nova sinteno kaŭzis, ke la esperantistoj en la nomitaj landoj aŭ rekomencis aŭ pliintensigis la "fosadon de la sulko" sur la verda kampo. Ni opinias, ke du faktoroj kaŭzis la novan sintenon al esperanto: la ĉiam pli kreskanta aplikado de esperanto en aktiva defendo de la mondpaco kaj la grava rezolucio de UNESCO en la j. 1954 pri esperanto. Ke la dua faktoro influis la opinion de gravaj aŭtoritatoj ankaŭ en Sovetunio, konfirmis al ni nia sovetia amiko, membro de la EK en Praha E. Kiselev.

Ni do rememoru laŭlande la okazintaĵojn en la pasinta jaro.

S O V E T U N I O. S. Bokarev, vicedirektoro de la Lingvosciencia Instituto de la Akademio de Sciencoj de USSR, iniciatis starigon de prepara organiza komitato por la fondo de Sovetunia Esperanto-Societo en la kadro de la Akademio kun filioj. En la komitato estas eminentaj kamaradoj, kiel ekz. koresponda membrp de la Akademio B. Serebrennikov. Esperantaj studrondetoj fondiĝis en la nomita Instituto, kiu dume ne povas alpreni ĉiujn scienclaborantojn de la Instituto, kiuj deziras ierni Esperanton, kaj en la Lomonosov-universitato en Moskva. Eklaboris kelkaj esperantistaj rondetoj en aliaj urboj. La Akademio de Sciencoj delegis E. Bokarev al la I-a konferenco de ĉs. esperantistoj-pacdefendantoj. La gazeto "Novoje vremja" favore menciis Esperanton. Kurso de esperanto por sciencaj laborantoj fondiĝis en la ŝtata universitato en Erevan, Armenio. La ĵurnalo de tiu ĉi universitato aperigis entuziasman redakcian artikolon pri esperanto. Prelego de Bokarev en la Leningrada Domo de Sciencistoj "M. Gorkij" vekis entuziasmon de la ĉeestantoj kaj oni elektis iniciatan grupon por organizi

TKKE INFORMAS 2 1956 -

skcion de internacia lingvo en la Domo de Sciencistoj kaj la nombron de sciigoj el Sovetunio kronas lastatempe la konfirmita informo, ke la sovet-unia ministerio de eksteraj aferoj uzis en noto al la japana parlamento, subskribita de M o l o t o v , esperanton. —

BULGARIO: Fine de 1954 la esperantistoj revekiĝis el peza dormo. Rekomencis vigla aktiveco, fondiĝis katedro de esperanto en la sofia universitato. Delegito de la bulgaraj esperantistoj partoprenis je ŝtata kosto la tutmondan packunvenon en Helsinki. Partia ĵurnalo raportas pri okazaĵo en la esperantista landa movado. Restariĝis la landa asocio, kiu laŭjure ne ĉesis ekzisti, la Esperantista kooperativo, lokaj societoj en la kamparo. En somero okazis denove lada kongreso kaj en 1956 oni planas i.a. okazigi someran tendaron lernejan laŭ la ekzemplo de Ĉeĥoslovakio. Inter la esperantistoj oni povas kalkuli i. a. Todoron Pavlov, prezidanton de la Akademio de Sciencoj. La Asocio ree eldonas sian organon, traktas kun la sofia radio pri renovigo de esperanto-dissendoj, kun la partio kaj junulara asocio pri diversaj gravaj aranĝoj kaj ĝi planas eldonadon de literaturo, al kio alvokis la bulgarajn esperantistojn siatempe eĉ Georgi Dimitrov.

POLLANDO: La Asocio ciam ekzistanta reintensigis en 1955 sian aktivecon kaj atingis plurajn sukcesojn: eldonon de kelkaj gravaj verkoj en esperanto fare de ŝtata instanco, prezidata de B. Bierut, unuflanke, kaj ricevon de digna, oni povas diri lukse meblita asocia oficejo en Kozia str. 3, aliflanke. Ĝi sukcese aranĝis internacian esp. renkontiĝon, okaze de la tutmonda junulara festivalo, laŭ invito de la komitato de la Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo. Refondiĝis lektorato de esperanto en Jagelona universitato en Krakovo. Pro la granda intereso en la mondo pri la polaj esperanto-eldonaĵoj ("Mickiewicz" de Jastrun jam estas eldonita!) la Asocio planas eldonon de pluaj polaj verkoj en Esperanto, La "Sinjoro Tadeo" estis eldonita f-inde de 1955, la »Faraono" de B. Prus estas nun kompostata.

HUNGARIO: Ankaŭ en tiu ĉi lando revekiĝis la movado en 1955 kaj organizas sin surbaze de la mondpaca movado. Fondiĝis kelkaj rondetoj kaj Hungarlanda Konsulta Konitato Esperantista. La budapeŝta radio elsendis kelkajn favorajn raportojn, kaj esperantlingve por Finnlando. Malfermiĝis kursoj de esperanto en pluraj urboj kaj en lernejoj ĉe la Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo, kun la sidejo en Budapeŝto, fondiĝis esp. fako.

VIETNAMA DEMOKRATA RESFUBLIKO: Tuj post la liberiĝo de la lando la vietnana Esperanto-asocio rekomencis la agadon kaj rekontaktis i. a. kun ĉs. esperantistoj. Ĝi planas eldonon de esp. literaturo. Interese estas, ke la asocio sendis per ĉs. ambasado en Hanoi petskribon al la ĉs. registaro kun la deziro renovigi la ŝtatatajn esperanto-dissendojn de Praha kaj subteni la ĉs. esperanto-movadon kiel pac-movadon.

GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO: La dua duono de la jaro 1955 alportis ankaŭ ioman ŝanĝon en tiu ĉi lando, kie neniu esperanta aktiveco estis pernesata. La aŭtoritatoj ne plu malhelpas uzi esperanton por la celoj de pacdefendo. Ekaktivis ankaŭ junaj germanoj: junaj esperantistoj el ses urboj kunvenis en Königstein. I.a. ili migris al la ĉs. landlimo, esperante paroli kun ĉs. samideanoj kaj kantante kantojn de la ĉs. Somera Esperanto Tendaro 1955.

ĈINA POPOLA RESPUBLIKO: Sole en tiu ĉi lando ĝis nun aperis neniu signo pri reaktiviĝo. Kvankam, laŭ nia informiĝo, nek la registaro, nek la partio faris iun ajn premon, male, k-do Mao Cetun kelkfoje favore esprimiĝis pri esperanto, la movado ĉesis en 1952, kian la gazeto "El Popola Ĉinio" estis resendata de poŝtoŝtatoj de GDR kiel "nedezirinda propaĝando" de kosmopolitismo" (tiu poŝtoŝtato certe eĉ ne per okulangulo iam vidis la Stalin-tezojn pri senklaseco de la lingvo). La ĉinaj esp-istoj opiniis utila rilate la internacian situacion de la ĈPR, provizore ĉesigi sian agadon kaj ne kompliki la situacion. De tiu tempo ili akceptas la poŝtaĵojn, sed ne respondas. Ili ne laboras kaj volas nenion iniciati, sed atendas la evoluon en Sovet-unio. (Ni esperas, ke la ĉinaj esperantistoj baldaŭ revizios sian sintenon kaj eklaboros).

TKKE INFORMAS 2 1956

ĈEĤOSLOVAKIO: Nia lando estas la unusola el la popoldemokratiaj, eble escepte de Pollando, kie la esperantista vivo malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj dum la lastaj kvin jaroj ne nur restis plej aktiva, sed kontinue daŭras. Kian la asocia centro devis likvidiĝi en 1952, la lokaj grupoj utiligis la eblecon kaj transiris al la sindikata organizo aŭ al la klerigaj institucioj Osvětová beseda, ĉar ne eblis eldoni gazeton, estis kvin cirkuleroj, kiuj dum tiu tempo helpis teni la movadon, konfornigi ĝin al la aktualaj bezonoj kaj utiligi la internacian lingvon por defendo de tutmonda paco: "La Pacdefendanto" (Plzeň), "Bulteno de EK Praha ĉe OB ONV2", bulteno de la EK en Brno, la junulara organo "Tagiĝo" (Opava) kaj en Slovakio "Juna voĉo" (tiu lasta havis jam kelkajn nomojn). Aparte ni devas citi la blindulan gazeton "Aŭroro", kiu denove, de 1945, aperis seninterrompe. Agnoskon kaj edifon por la porpaca aktiveco de la ĉs. esperantistoj signifis letero de la respublik-prezidenta oficejo el 1. 9. 1954, en kiu oni deziras "multajn sukcesojn al la esperantista laboro, kiu helpas la porpacajn klopodojn". Ankaŭ la esperantistoj-pacdefendantoj en la mondo rekonis tiun laboron elektinte k-don R. Burda kiel prezidanton de MEM. La esp. vivo manifestiĝis dum tiuj jaroj ne nur en la lokaj rondetoj, sed ankaŭ en la ĉiujare aranĝataj someraj kursaroj, ekz. la kolegio en Doksy jan 10-foje, la junulara somera tendara lernejo 4-foje, kaj en pluraj regionoj kunvenoj, ĝis venis en 1955 la ebleco aranĝi la I-an tutŝtatan konferencon de esperantistaj pacdefendantoj kun tricento da partopronantoj el ĈSR kaj kun gastoj el kvin ŝtatoj. La ĉs. esperantistoj povas fieri, ke ili grave hejpis al la interŝanĝo de kulturvaloroj inter la popoloj (al kio cetere alvokas la rezolucioj de la Monda Packonsilantaro) ebligante per sia traduklaboro eldoni en naciaj lingvoj verkojn de elstaraj ĉs. verkistoj. En la lasta tempo aperis tiamaniere, ĉu en tuta amplekso aŭ en fragmentoj, verkoj de Drda, Pujmanová, Pilař, Hlbina, Hašek en la ĉina lingvo (same ankaŭ la ĉs. konstitucio), "Bapto de caro Vladimir" de Havlíček en Kanariaj insulpoj, Neruda kaj Arbes en la dana lingvo, progresemaĵoj aŭtoroj en la japana kaj en la lastaj monatoj ankaŭ en la vietnama lingvo. La plejparton de tiu laboro por la Ekstrema Oriento faris nia nelacigebla s-ano Ota Ginz. Ankaŭ la gazetaro, post la rezolucio de UNESCO kaj reaktiviĝo de esperantistoj en Sovetunio, iom post iom raportas objektive pri nia laboro.

La plej lasta elstara kultura ago mondformata estas la eldono de gramofon-diskoj kun arioj kaj duetoj el la "Vendita fianĉino" de Smetana, pri kio meritas esperantistoj en Olomouc.

Dezirante havi fine iun centron, kiu helpus la agadon en la lando, kunordigus kaj reprezentus antaŭ la publiko, la ĉs. esperantistoj trovis konvenan fornon de tiu centro, konfornan al la aktualaj eblecoj, elektinte en la regiona kunveno en Olomouc (1954) kaj poste definitive en Otrokovice (1955) la Tutŝtatan Konsultan Komitaton Esperantistan. La ĝisnunaj spertoj plene pravigas ĝian ekziston.

Ni donis mallongan resumon pri la okazintaĵoj en la esperantista aktiveco lastatempa en Sovet-Unio kaj en la popol-demokratiaj landoj. La perspektivojn de la proksima estonteco ni ne tuŝas, opiniante, ke ĉiu iom sperta samideano mem povas imagi ilin.

Jar. Mařík - Jos. Vítek

Tiu ĉi numero de "TKKE INFORMAS" aperas en 1500 ekzenpleroj.

Ĉiujn elspezojn (papero, preso, dissendo) afable transprenis ESPERANTISTA KLUBO ĉe OSVĚTOVÁ BESEDA ONV 2 en PRAHA, al kiu la estraro de TKKE esprimas sincerajn dankojn en la nomo de ĉeĥoslovaka esperantistaro.